

Heinrich Heine,

[Ne scias mi, kio okazis]

*tradukita de Paul Gottfried Christaller*

*El la “Libro de la kantoj”, parto “La Reveno”.*

Ne scias mi, kio okazis  
al mia tristema kor':  
Antikva legendo min kaptis,  
ne cedas el mia memor'.

La Rejno fluadas trankvile  
murmuras kiel mister',  
la supron ĝstonegan orumas  
sunbriloj de la vesper'.

Plej bela virgino jen sidas  
mirinda sur la montet'  
kaj ŝia oraĵo radias,<sup>4</sup>  
si logas kiel magnet'.

Si kombas la oran hararon  
abundan per ora kombil',  
kantante misteran lidon,<sup>5</sup>  
ravantan kiel sunbril'.

Ŝipisto en sia ŝipeto  
kaptiĝas per stranga dolor',  
la rifon li tute ignoras.  
atentas nur ŝin kun fervor'.

...

Heinrich Heine,

Lorelejo

*tradukita de Joachim Gießner*

Heinrich Heine,

The Lorelei

*tradukita de Mark Twain*

*An ancient legend of the Rhine*

Malgajon mi sentas en koro,  
sed kial tia tim'?  
Legendo el pratempa foro  
Vagadas tra mia anim'.

Jam fluas la Rejn' en malhe-  
lo,  
kaj malvarmetas l' aer'.  
Sed brilas la mont' en orbelo  
pro suna lum' de l' vesper'.

Jen supre kabino provokas  
per ora juvelar',  
kaj ŝia beleco allogas  
kaj ŝia ora harar'.

Si kombas ĝin, kantas  
sorĉige,  
sirene kantas ŝi  
per neimagebla, mirige  
potenca melodi'.

Ŝipiston en eta boato  
Turmentas koremoci'.  
Ne ĝenas lin rifo-kaskado,  
rigardas nur supren al ŝi!

...

I cannot divine what it meaneth,  
This haunting nameless pain:  
A tale of the bygone ages  
Keeps brooding through my brain:

The faint air cools in the gloaming,  
And peaceful flows the Rhine,  
The thirsty summits are drinking  
The sunset's flooding wine;

The loveliest maiden is sitting  
High-throned in yon blue air,  
Her golden jewels are shining,  
She combs her golden hair;

She combs with comb that is gol-  
den,  
And sings a weird refrain  
That steeps in a deadly enchant-  
ment  
The listener's ravished brain:

The doomed in his drifting shallop,  
Is tranced with the sad sweet tone,  
He sees not the yawning breakers,  
He sees but the maid alone:

...

<sup>4</sup>En la sube menciiita kajero, el kiu mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi esperantigon, la linio tekstas: "kaj sia oraĵo radias", kun "sia" anstataŭ "ŝia". Tio ŝajne estas aŭ pres-eraro aŭ gramatika eraro de la tradukinto.

<sup>5</sup>En la origina versio troviĝas tie ĉi la vorto "liedon", kio estas aŭ pres-eraro aŭ neologismo inventita de la tradukinto Paul Christaller.

Mi kredas: la ondoj englutas<sup>6</sup>

    sipiston, ŝipeton je l' fin',  
    kaj kulpa pri tio nur estas  
    kantado de la virin'.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de PAUL GOTTFRIED CHRISTALLER (\*1860-08-21 – †1950-12-31).*

*Arg-2-1116 (2010-09-13 10:03:39)*

*Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi tradukon el la libreto “H. Heine - Libro de Kantoj”, eldonita en 1911 de la “Esperanto-Propaganda Instituto” (Leipzig, Kaiser-Wilhelm-Str.15), 2a eldono. /Sur la frontpaĝo de la kajero estas malsupre indikita ankaŭ: Eldonejo Rothermel, Friedrichswerth (Thüringen) kaj supre: Popola Biblioteko Esperantista n-ro 2.] Die deutsche Urfassung von Heinrich Heine siehe: “Buch der Lieder”, Abschnitt “Die Heimkehr”. - Informoj pri la tradukinto Paul Christaller troviĝas en la vikipedia retejo [http://de.wikipedia.org/wiki/Paul\\_Gottfried\\_Christaller](http://de.wikipedia.org/wiki/Paul_Gottfried_Christaller), kun foto de li.*

Ĝis tiras kun si al Rejn-fundo  
la ondoj lin kun boat'.

Nun kuſas li en la profundo  
pro Loreleja kantad'.

The pitiless billows engulf him!-  
So perish sailor and bark;  
And this, with her baleful singing,  
Is the Lorelei's gruesome work.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)*

*Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kant-kolekto “Mia kantaro I”, eldonita de Josef Schiffer (Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: Josef.Schiffer@t-online.de ), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo “Fervoja Esperantisto” de Germana Ferojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo 3.*

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en la Anglan de Mark Twain.*

*Arg-2-11 (2003-10-13 04:42:59)*

*A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leibzig: Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain 1880 (rf. <http://www.loreley.com/loreley/marctwai.htm>)*

---

<sup>6</sup>Mi, Manfred Retzlaff, enmetis la duoblan punkton post la vorto “kredas”. Ĝi mankas en la origina traduko de Paul Christaller.